

KVIN ESPERANTISTOJ PLEJ MULTE PROPONITAJ

Mikaelo BRONŜTEJN

DEK TAGOJ DE KAPITANO

POSTNIKOV

Tiĥvin, Rusio, 2004, 332 p.

Dum dek tagoj Zamenhof kaj Postnikov renkontiĝos sur la ferdeko de pasaĝerŝipo kaj parolas pri la kutimaj problemoj de la Esperanto-movado. [...]

Tra la intrigo de la romano ni penetras la rusan socion de la komenciĝo de la 20-a jarcento. Kelkaj nehistoriaj personoj kreitaj de Bronŝtejn, Modest Skipidarnikov kaj la neesperantistaj amikoj de Postnikov, ekkonsciigas la leganton, ke apenaŭ ekzistas esencaj diferencoj inter la nuna Rusio kaj tiu de la caroj. Bronŝtejn verkis interesan, valoran rusan romanon por esperantistoj. Tra la tuta romano ni sentas, ke la aŭtoro sin konsideras rusa, kaj ke por li ankaŭ Esperanto estas rusa afero, same kiel por Zamenhof. Sed tio ĉi ne estas ŝoka, temas ja pri la historio de la rusa movado, pri Esperanto en Rusio.

LG138, 15dec09, Eugène de ZILJAH



biografioj, min aparte gvidis la ideo fari rakonton pri iliaj vivoj. Ĉies vivo estas aparta rakonto, la travivaĵoj ĉiutagaj ĉapitroj. Legante la ĉapitrojn, oni ne povas neglekti, ke ĉies vivo estas aparte brila gemo. Pri la verkoj de niaj aŭtoroj, surbaze de la antologiaj prezentoj kaj hazarda legado, juĝos la legantaro. Pri la vivoj de unuopaj aŭtoroj – la historiistoj. Nia libro apartenas al neniu el ili laŭ tro strikta juĝo. Tamen ĝi celas esti nia kontribuo al historiografio de Esperanto.

enkonduko al la libro, Josip PLEADIN

Baldur RAGNARSSON

SAGAO DE NJAL : traduko

FEL, Belgio, 2003, 358p.

Por tiuj, kiuj ne komprenas la islandan, la kvalito de la traduko estas certigita per la fakto, ke ĉi tiu versio estis farita de Baldur Ragnarsson, akademiano kaj konata poeto-verkisto, verkanta kaj en la islanda kaj en Esperanto. La rezulto de lia laboro estas ne nur kompetenta, sed vere elstara, prezentanta gravegan kontribuon al la kreskanta nombro da esperantigitaj juveloj de la monda literaturo.

[...] Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj en la jaro 2002, ĝi estis elektita kiel “unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda literaturo”.

Monato 2004/7-8, Garbhan MACAOIDH



Enrico DONDI: traduko

PURGATORIO de DANTE

Fonto, BR, 2000, 256p. A4

Dante estas la plej varme eterna itala poeto, kaj samtempe la plej dokta el teologia kaj filozofia vidpunktoj...: streĉa tensio...

Nun, tiu tensio venas al ni en Esperanta formo dank' al sindediĉa strebo de Enrico Dondi, kiu dum sia tuta vivo tradukis, poluris, plibonigis ĉi tiun tradukon; kaj la finfina – tiom malfruiganta! – presita versio estas probable ankoraŭ ne la lasta, ĉar supozeble Dondi ne ĉesos reveni al la eterna poemo. Oni ne povas liberiĝi de Dante ... [la] tradukisto ... enfokusigis la ambician celon de rigora fideleco ne nur al la enhavo, sed ankaŭ al la formo de la Dantea poezio. *Esperanto, decembro 2003, Mauro NERVI*



Spomenka ŜTIMEC

KROATA MILITA NOKTLIBRO

Pro Esperanto, AT, 1993, 104p.

“Prelego esperantlingva ebligis min renkonti la kroatinon Spomenka Ŝtimec en 1990 [...]

Tamen tiu mondanguleto estis en paco. Ĉu Spomenka Ŝtimec havis antaŭsenton de la eventoj poste okazontaj. Kiam la milito eksplodis, mi repensis pri [ŝi]. Multe pli malfrue, mi eksciis ke ŝi estis mergita en la kerno de tiu milito kaj ŝi estis ŝirita, ĉar ŝi havis ŝatatajn gekuzojn serbajn. Ŝian belan sinceran ateston mi decidis traduki por konigi ĝin en Francio.

La libro jam estis tradukita en la japana kaj la germana, kaj eble baldaŭ estos tradukita en la itala [...]

Oni ne eliras ne tuŝita el la legado de tiu libro. Kelkaj amuzaj anekdotoj ornamas la rakonton ofte malĝojan. Kaj ĝi finiĝas per pozitiva « noto »”

LG116, Ginette MARTIN

Spomenka Ŝtimec estas ankaŭ proponita por *Geografio de miaj memoroj* kaj por *Tilla*.



Josip PLEADIN

ORDENO DE VERDA PLUMO

Grafikom, Kroatio, 2006, 272p.

La intenco de mia libro estis prezenti la verkantojn ne per iliaj verkoj, kiel tion faras la antologioj, sed prezenti ilian personecon, la vivon kiun ili travivis, kelkfoje eĉ iom nekutime prezenti ilin el faktografia vidpunkto. En kolektado de iliaj

